SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO, ADMINISTREJO K SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO : 67, avenue Gambetta, Paris 20e
Poŝtĉekaj kontoj je nomo de SAT-Paris : Bruxelles n-o 350 189, S'Gravenhage n-o 211 533, Kopenhago n-o 4 986, Paris n-o 1234 22, Stokholmo n-o 74 153, Wien n-o D-109 068, Zagreb n-o 41 448, Zürich n-o VIII-200 49. Alilande oni pagu per poŝtmandato je nomo de SAT. bonvalutaj devizoj en rekom. letero aŭ bankĉeko je nomo de « Bannier ».

RAPORTARO DE LA PLENUM-KOMITATO DE SAT (1935-36)

A. Ĝenerala Parto

Konsisto de la Plenum-Komitato. — La Komitato reformiĝis en Parizo, post kiam la pariza kongreso estis aprobinta (unuanime) la agadraportojn lastjarajn k neniu alia urbo estis proponinta kandidatojn por la nova dujara periodo, por kiu validas mandato de P.-K. (vd. Statuton, paragr. 10). Ĉar post la foriro el Parizo de K-do *Bubo* la Komitato konsistis nur el 5 membroj, necesis al-elekti unu novan anon, laŭstatute. Okaze de la elektoprocedo mem K-do *Ĝermen* deklaris sian eksiĝon el la P.-K. pro ofta malharmonio kun la ceteraj P.-K.-anoj « en la ĝenerala koncepto pri la taskoj k la rolo de nia Asocio » (vd. n-on 434 de « S-ulo », p. 75). La fakto estas, ke K-do Ĝermen en la tempo inter februaro 1935 k aŭgusto 1935 ŝanĝis sian sintenon k koncepton pri la unuec-problemo. Dum en februaro li aprobis senrezerve (eĉ *skribe*) kiel la ceteraj P.-K.-anoj la enhavon de la artikolo, aperinta sub titolo « Principoj de Unueco » en la februara « S-ulo » (1935), verkita de K-do Lanti laŭ komisio de la P.-K., li en aŭgusto 1935, t.e. okaze de la kongreso, kredis devi pledi por la vidpunkto de K-doj kiuj opinias realigebla la unuecon sen rigora apliko de la nomitaj gvidprincipoj de SAT. Post elekto de anstataŭanta K-do okazis la re-distribuo de l'funkcioj de P.-K.-anoj, en la kunveno de l'29-a de oktobro. Kiel prezidanto elektiĝis K-do *Banmer*, SAT-ano 11, kunfondinto de SAT. La novaj membroj en la P.-K. estas K-doj *Avid* k *Piron*.

Ĝenerala Konsilantaro — Konflikt-Komisiono. — Notinte lastjare pri la elekto de Ĝ. K.-anoj por la *horzonoj* (kategorio A), ĉi-jare ni povas konstati la funkciadon sufiĉe normalan de tiu instanco. Estis dissendataj de la P.-K. unu k de la K.-K. dua cirkulero al la Ĝ.-K.-anoj, el kiuj granda parto respondis. Ni mem, kiel tion antaŭvidas la Statuto, rilatas nun kun la konsilantoj nur pere de la K.-K.-sekretariejo, kiu lasta havas la taskon koncentrigi ĉe si la korespondaĵojn de la konsilantaro k kiu sialoke raportos pri sia laboro. Rilate nian sintenon en la unuecfronta problemo, ni ricevis la plenan aprobon de la Ĝ.-K.-anoj, kiuj respondis pri tiu punkto en la unua cirkulero, k ni notis diversajn iliajn sugestojn (tiun de K-do *Veder* eĉ en la gazeto).

Referendumo. — La referendumon pri du proponoj el la lasta kongreso (*a*) Aldono al par. 9-a de la Statuto ; *b*) Frakcia Regularo) partoprenis 247 membroj (proks. 18 % el la membraro). El ili 227 akceptis ambaŭ proponojn, 5 malakceptis la unuan, 12 la duan k 3 ambaŭ proponojn. La koncernaj tekstoj sekve validiĝis.

Frakcioj. — Unuan jaron aplikiĝas la Frakcia Regularo, akceptita ĉe la lasta kongreso. Ŝajnas ankoraŭ tro frue, por riski definitivan juĝon pri la valoro de tiu Regularo. Ĝian principan neceson pruvas tamen la fakto, ke kvar frakcioj dum la jaro pli malpli regule funkciadis, el kiuj unu restarigita : la anarkista. La sperto jam montras, ke praktike la Frakcioj ne povas konsisti nur el SAT-anoj (kun escepto de la Sennaciista Frakcio). Oni vidu tiurilate la socialistan, la anarkistan frakciojn. Cetere tio ne povas esti nepra postulo de SAT, *ekster* kies kadro funkcias la Frakcioj. La solaj postuloj de nia organizo estas tiuj formulitaj en la Regularo. La kondiĉo tamen por tio, ke SAT donas al Frakcioj sian apogon, estas, ke SAT-anoj formu en la koncernaj frakcioj la *kernon*, la *aktivularon*.

La Kongreso devos rekonfirmi la Regularon, se ne intertempe prezentiĝos proponoj pri ŝanĝoj aŭ aldonoj al ĝi.

Administracio k Redakcio funkciis kiel en la antaŭa jaro, ĉe la Sidejo de SAT. Pro severaj ŝparaj kaŭzoj, por plene ekvilibri la novan buĝeton, serioze ekzameninte la lastjaran bilancon k konstatinte, ke diversaj provizoraj ekstraj laboroj estas finitaj (rilate instalon de l'sidejo k libraro en Parizo, refondon de l'librotenado post la transpreno el Leipzig, ADLEL), la P.K. decidis, tuj post la lasta kongreso, rezigni je la salajrita laboro de K-do Ĝermen. Sola restis kiel salajrata oficulo K-do *Bartelmes*, kiu, estante redaktoro de la organoj k jam antaŭe zorginte pri la administraj laboroj rilate membrosliparon (kotizoj) k gazet-adresilaron (ekspedo), transprenis ankoraŭ parton el la laboroj ĝis tiam faritaj de K-do Ĝermen (libromendoj, korespondado). K-do *Banmer*, prezidanto de la P.K., plue dediĉis senpage sian liberan tempon por plenumi la librotenadon, prizorgi la kas-aferojn k tiurilatan korespondadon k div. aliajn laborojn, kiujn postulas la bona funkciado de la centraj servój. Eĉ nun ni bedaŭras, ke ni ne pli frue ekŝparis la salajron de K-do Ĝermen. Nun ni konstatas, ke dum la pasintaj 10 monatoj la Adm. k Red. tre normale funkciis, per la nuraj zorgoj de Banmer k Bartelmes. Certe la maldungo de K-do Ĝ. pliŝarĝis la du restantajn oficulojn, sed ilia plia penado estas rekompencata per la penso, ke tiel pli bone fartas la asocia kaso.

Pri la Adm. k Red. (teknika parto, ciferoj) aperos apartaj raportoj, same pri la ĉapitro *Presejo* k *Eldon-agado* (koncerne libro-eldonadon). Ni akcentu nur ĉi-loke denove, ke SAT estas la sola lab. esp. organizo, kiu sukcesis, malgraŭ politika k ekonomia krizoj, aperigi regule siajn du revuojn k la Jarlibron, enhavanta fidindan adresaron.

Breĉo. — En la lasta kongreso K-do *Pâris* faris la proponon peti de la membraro ekstran pagon, por fine amortizi la ŝuldon, kiun lasis la pasintaj batal- k krizo-jaroj. La kongreso decidis, ne akceptante la ideon pri ekstra pago, speciale vigle alvoki por « ŝtopado de la Breĉo » per la oficiala organo. Fakte la iniciato mem estis bona, k ankaŭ la kontribuado, pri kiu ni kvitancis en la gazeto (se la sumoj superis 5 frankojn francajn) estis sufiĉe kontentiga. Eĉ K-doj, kiuj finance troviĝas en tre nefavora situacio, transpagis por tiu celo sumetojn. Tiom pli ni bedaŭras, ke aliaj anoj, kiel la iniciatinto pri la ekstra pago mem, ne faris sian eblon...

La intertraktoj kun IPE (nur kun IPE, ĉar ISE neniam klopodis partopreni en starigo de unueco !). — Ni raportis en konciza formo en preskaŭ ĉiu numero de « S-ulo » pri la stato de l't.n. unuec-traktadoj, — parte per represo de l'leter-interŝanĝo, se ni juĝis tian represon (k foruzon de l'spaco) necesa, — parte per citoj el la gazetoj de IPE. La legantoj sekve estas informitaj pri tio, ke la intertraktoj ĝis nun ne liveris iun konkretan rezulton. La plej multaj K-doj sendube aprobos, ke ni ne dediĉis ankoraŭ pli da spaco el nia organo al tiu afero (oni bone memoru, ke granda parto el la legantoj de « S-ulo » eĉ ne estas SAT-anoj !), por ne tedi la K-dojn per « literaturo », kiu per si mem prezentas nenian progresigan elementon. Se tamen ekzistas K-doj, al kiuj plaĉus, se ni plenigus multajn paĝojn, por komplezi al IPE, per agitmaterialo pri PEK-laboro ks, ke tiuj bone komprenu, ke ni tro serioze konsideras nian gvidan taskon, por lasi nin irigi sur tiun vojon.

Resumo de l'faritaĵoj. — En aŭgusta « S-ulo » ni publikigis leteron de IPE al la kongreso de SAT, k ties respondon senditan al la IPE-kongreso kune kun la gvidrezolucio. *Nur meze de oktobro* IPE respondas, per letero kiun ni publikigis en novembra « S-ulo ». IPE aldonis al sia komenta letero la respondon de l'IPE-kongreso al la punktoj de l'SAT-letero. La komentoj de l'Centro estas tiel drastaj k signifaj, ke ni ne volis malpliigi ilian klaran sencon per publikigo de l'popunkta respondo de la kongreso, — respondo malpreciza k nekontentiga, ĉar evita rilate la ĉefan k esencan punkton : *la ebligo de l'SAT-propagando en Sovetio*[1] (ĉiuj aliaj punktoj estas bagatelaj, sensignifaj kompare kun tiu). Niaj gazetoj estas redaktataj kun tia respekto pri objektiveco, ke ilia malpermeso, efektiviĝinta kiel sekvo de la skismo sur la sovetia teritorio, estas tute absurda. La samo estas direbla pri la SAT-libroj. Imagu, ke eĉ libroj kiel « Ŝtato kaj Revolucio » (de Lenin) k « La Komunista Manifesto » ne havas permeson eniri Sovetion, *ĉar ilia eldoninto estas SAT* ! Ĉu pli granda absurdaĵo estas imagebla ?

Por ni tiu punkto estas la akso, ĉirkaŭ kiu turniĝas ĉio alia : ni ne povas koncepti mondskalan unuec-agadon kun *organizo, kies ĉefa kolono estas la soveta sekcio* (SEU), se tiu organizo ne faras la necesajn paŝojn por nuligi la malpermeson de nia Asocio k de ĝiaj eldonaĵoj en la lando de l'proleta diktaturo. Ni atendis vane tiurilatan elpaŝon...

Ni respondis baldaŭ post ricevo de l'letero el IPE-centro al ĝi (la respondo aperis sub la IPE-letero en nov. « S-ulo »). Ni ricevis novan leteron, meze de decembro, en kiu ni trovis la koncepton, ke komuna agado devas okazi ĉirkaŭ iuj *politikaj taskoj* (batalo kontraŭ faŝismo, imperiismo k milito, k.s.). Ni respondis al tiu letero la 27. decembro, simple konstatante, ke neniu el la

---

[1] Nome, libera enkonduko de l'SAT-gazetoj, k SAT-eldonaĵoj, libera k senriska aliĝo al SAT.

leteroj k rezolucioj interŝanĝitaj ankoraŭ publikiĝis flanke de IPE; sekve ilia promeso ne estis plenumita.

Ni devis atendi ĝis *fino de januaro*, kiam fine aperis, post plurmonata interrompo, n-o de « Sur Posteno », kiu enhavas *parton* de la dokumentoj pri la unuec-intertraktoj. Sed mankis en ĝi la *grava letero de IPE-centro* de l'1. oktobro, kiu sin deklaris kontraŭ allaso de iuj tendencoj el la lab. movado en komunan organizon eventualan. Post nia atentigo, finfine en marto aperis ankaŭ tiu dokumento en « S.P. ».

Ŝajnas al ni utile rimarkigi, ke la nomita letero de la IPE-Centro estis konsiderata kiel « mallertaĵo » ĉe la kongreso de la francia sekcio de IPE (en aprilo 1936), — mallertaĵo ja nur pro tio, ke ĝi estis publikigata en *Sennaciulo*, k... post longe, ankaŭ en « Sur Posteno ».

Sed depost nia respondo (fine de decembro) ni restas sen plua respondo el la IPE-centro. Anstataŭe la al Londono transloĝiĝinta sekretario de l'IPE-oficejo ekstersovetia, nur kelkajn tagojn antaŭ reapero de « S. P. », klarigis al ni la kaŭzon de l'prokrastita enpreso de dokumentoj. Al tiu skribaĵo ni respondas la 19. februaro, substrekante ke ni « kun bonvolemo ekzamenos la eblon havi iun tagon intervidiĝon kun la tri komisiitoj de la lasta IPE-kongreso » — intervidiĝo ĝis tiam neakceptebla niaflanke, pro la fakto ke la duma leterinterŝanĝo kun la centro ne liveris la necesan bazon de konfido, kiun oni nepre bezonas por povi interrilati en senĝena kamaradeco kun komisiitoj. Ankaŭ pro tio, ke ne ankoraŭ aperis ĝis tiam la leteroj interŝanĝitaj en « S.P. ».

Ni ne ricevis respondon koncerne la intervidiĝon; anstataŭe, oni mokis en « S.P. » (marto) pri nia bonvolema sinteno, k oni ŝajnigis nekompreni, kial ni ne tuj kun larmoj en okul' konsentis brakumi la IPE-eliton! — Sed en la aprila n-o de *Prol. Esperantisto* (organo de la francia sekcio de IPE) ni trovas jenan klarigon : La trimembra komisiono, elektita de la kongreso, skribis leteron al la Centro en Leningrado, por havi konfirmon de la mandato ricevita en Antverpeno; al tiu peto IPE-Leningrado ne respondis! Do ni povus pensi, ke tiu Komisiono ne estas rajtigita de IPE, por trakti kun la Plenumkomitato de SAT, — kio pruvas la pravon de nia sinteno rilate al la nomita Komisiono...

Kaj oni skribis ankoraŭ ion pli malbonan en la febr. n-o de « S.P. »; tie nome oni povas legi, ke « ni (t.e. centro de IPE k SEU) *dum iuj kondiĉoj sur iu certa kampo* povus ekiri komunan fronton kun » — parto da SAT-anoj, sed ke ili konsideras la SAT-estrojn simple kiel kontraŭrevoluciulojn! Nu, ĉu kamaradeca intertraktado eblas kun kontraŭrevoluciuloj? Gek-doj, fronte al tia spiritostato, ĉu ne estas nia devo, kiel gvidantoj de nia organizo, esti tre singardaj rilate la intertraktojn kun IPE? Ni pensas, ke jes, k pri nia tiurilata agado ni plene respondas antaŭ vi.

El la plumo de ĉefaj IPE-gvidantoj ni cetere posedas abunde dokumentojn, kiuj atestas pri ilia ŝanĝiĝemo, sekve de partiaj konsideroj. Ni do staras antaŭ tre klara alternativo : aŭ ligi la sorton de esperanto al la zigzaga taktiko, al la ŝanĝiĝaj bezonoj de partioj, — aŭ cementi la movadon sur laŭaj principoj, kiujn postulas la esenco, la aparta karaktero de nia prolet-esperanta movado.

Sole la principoj aplikataj de SAT (vidu « S-ulo »-n de februaro 1935) ebligas *faktan, daŭran* unuigon de *ĉiuj* laboristaj esperantistoj, kiuj *sincere* deziras la unuiĝon. Tiom longe, kiom oni obeis ilin, tiom longe prosperis nia movado. Kaj kiam parto de la tiamaj SAT-anoj perfortis tiujn principojn, tiam krizo, malprospero, baraktoj baldaŭ montriĝis. La racio k la sperto instruas do al ĉiuj sinceraj k klarvidaj homoj, ke ili senŝanceliĝe laŭiru la rektan vojon, ĝis nun sekvitan de SAT.

Rilato kun LEA-oj. — Estis observataj ambaŭparte la paragrafoj de l'Gotenburga Konvencio, t.e. ke SAT trovis ĉe la estraroj k en la organoj de l'grandaj LEA-oj la necesan moralan k materian (per anoncoj) subtenon, dum SAT siavice raportis en sia oficiala organo pri la okazintaĵoj en la vivo de l'LEA-oj, k ankaŭ pri iliaj labormetodoj kc.

La nederlandlingva LEA (FLE) subvenciis nian ĉefan peranton en Nederlando per monsumo de 20 guldenoj por lia laboro, k pluigis, apogante sin sur rekonfirmitan kongresan decidon, la devigan abonon de sia anaro al « S-ulo ». Aliflanke ni interpretis iom larĝe la gotenburgan konvencion, permesante al FLE eldoni krom sia « Kantaro » la Legolibretojn « Unuaj paŝoj en la mondon », same al la Dana LEA eldonon de « Kantaro », en kiu kompense troviĝas granda anonco pri SAT.

Kelkfoje ni legis aŭ aŭdis opinion de iuj, kiuj malfavore rilatas al SAT, k kiuj kvazaŭ ĵaluze direktas al ni riproĉon, ĉar ni profitas el niaj bonaj rilatoj kun la nederlanda LEA por plialtigi la eldonkvanton de « S-ulo » k ĝenerale tiele plibonigi la eldonkapablon de nia asocio! Nu, ŝajnas al ni esti memkompreneblaĵo, ke se movado lab.-esp-ista floras en iu regiono, ĝi ne forgesas pri la situacio en tutmondo, konsciante pri la senlandlimeco de esperanto k precipe de la laborista esperantismo! Kaj ankoraŭ en Nederlando la K-doj ne forgesis la unuan malfacilan tempon, kiam ĝuste pioniraj SAT-anoj sukcesis ekvigligi la movadon en tiu lando k la influo de SAT sur la landan movadon donis neneigeble favoran rezulton... Cetere la nederlandaj K-doj tute prave nur *fieras* pro tiu sia aktiva subteno al la tutmonda movado, en la momento, en kiu la diktatorecoj en multaj landoj forbaris de SAT la alfluon el gravaj laboristaj centroj de la mondo. Ja iam ni profitis same el la forto de la germana LEA-movado, kiel ni profitas hodiaŭ el tiu de la nederlanda, k ankaŭ la iama sovetlanda esp. movado kontribuis (precipe rilate la librodebiton) atentinde al la forto de la tutmonda movado (SAT). Al la nomitaj enviemuloj ni diru plie, ke **eĉ sen la kontrakto kun N.F.L.E. pri kolektiv-abonado al « S-ulo » la regula aperado de « S-ulo » restus plene garantiita.**[1] Ĵus ankaŭ la norvega LEA intertraktas kun ni pri kolektiv-abonigo de sia membraro al « S-ulo ».

Rilato kun Sovetio. — Diversaj provoj montris al ni, ke la cenzuro malhelpanta la eniron de SAT-eldonaĵoj (gazetoj, libroj), restis same rigora kiel antaŭe. Instigite per noto aperinta en la nacilingva gazetaro pri dekreto de l'eksterkomerca komisaro sovetia, ke permeso pri enkonduko de eksterlanda literaturo en Sovetion estas akirebla nur pere de « Mejdunarodnaja Kniga », (Moskvo), kiu havas monopolon tiurilate, ni skribis en septembro 1935 al la citita instanco, eksplikante niajn dezirojn. Ni ricevis nenian respondon, same kiel ni ne ricevis respondon pri tiu punkto de IPE. Praktike sekve nia kontakto kun Sovetio restas komplete rompita.

Lingva Komitato. — Konforme al la lastjara kongresdecido ni ekrilatis *a*) koresponde, kun eventualaj kandidatoj; *b*) kun la Lingva Komitato, por prezento de l'kandidatoj, kiuj estas K-doj *Bartelmes* k *M. Roux*. Kiam la eventualaj akcepto k elekto okazos, ni ankoraŭ ne scias.

Propagando. — Por kontentige solvi la kotizpagan problemon, t.e. sufiĉe frutempe en la jarkomenco ricevi la ĉefan parton de l'membrokotizoj k abonoj (ĉu partopagoj, ĉu tutjaraj pagoj — ĉi lastaj tre faciligas nian administran laboron), ni fiksis libropremion (t.e. livero de l'granda romano « Jimmie Higgins » de Sinclair por tre rabatita prezo), kiu instigu al frupagado de l'kotizoj. Efektive tiu ideo estis bonakceptata de la membraro, k relative multaj profitis la okazon por havigi al si kun la membromarketoj la belan volumon el la SAT-literaturo. Ni ne bezonas aparte substreki, ke ankaŭ la SAT-kaso havis netan profiton per tiu disvendo.

Ni sendis specimenojn, katalogon, aliĝilon, al ĉiuj, kiuj petis pri tio; entute tia petado okazas sufiĉe ofte. Tamen nur malgranda elcento el la petantoj efektivigas vere sian intencon aboni la gazetojn aŭ aliĝi la asocion. Ni rezignis ĝenerale sendi al *nepetintoj* tian materialon, escepte se ni trovis adresojn, kiuj ŝajnis al ni de interesebluloj laŭ varba vidpunkto, en div. esp. gazetoj. Ja ni konstatis lastjare, ke la sistema larĝskala dissendado de propagandmaterialo al nekonatoj ne liveris la deziritan rezulton, kvankam ĝi signifis sufiĉe gravan elspezon. Unuafoje depost la skismo, ni povis planti radikon en Japanio; promesplena komenciĝo estas farita en Finlando, post intertraktoj kun tiea longjara SAT-ano. Aliloke la propagando por SAT dependis ĉefe de la bonvola klopodado de centraj aŭ lokaj *perantoj*, kiuj laboris kun pli malpli bona sukceso. Ĉi tie nur kelkaj nomoj : *Bas Vels*, Roterdamo, por tuta Holando; *Amundsen*, Oslo; *Ege*, Usono; *Erikson*, Svedio; *Sulski*, Britio; *V. Aelst*, Belgio; *Leblanc*, Nordfrancio, kiuj laboris kun dankinda fervoro k pririkoltis plugindan kampon. Multajn aliajn nomojn ni povus mencii kun plezuro (i.a. en Hispanio, Portugalio, Danio, Polio, Ĉeĥoslovakio), sed devas rezigni pro spacaj konsideroj, k ĉar ilia agadkampo estis pli limigita.

Konkludo. — Ni ĉi-jare aparte volas insisti pri tio, ke la Gek-doj komprenu, ke pro la malfavora al la proletaro politika situacio en multaj landoj, k pro la aparta kazo de Sovetio, nia organizo nuntempe ne povas havi la amplekson k la disradiadon dezirindajn. Ĝuste tiu fakto devus esti instigilo al la K-doj en regionoj, kie SAT ĝuas plenan disvolviĝeblon, fari sian plejeblon por vivigi plenforte nian asocion, tiel ke, la tagon kiam revenos en nian domon la nuntempe forbaritaj fratoj (ja certe tiu tago venos!), ili kuniĝos kun ni en plenforte funkcianta, prospera organizo, kies sola nomo sufiĉas por inspiri al ili konfidon k respekton. Ni akcentis ĉiam k ĉiuokaze en niaj organoj pri la esence esperantista k laborista karaktero de nia asocio. Ni fiere levis nian standardon k ni ne konsentis al cedoj aŭ kompromisoj rilate la principobazon de nia Statuto. Rimarkinte, ke en iuj lab. esp. rondoj (SEU, BLEA en Britio, ka.) lastatempe disvolviĝis inklino al strangaj koalicioj k « unuecfrontiĝoj » kun neŭtralaj, neproletecaj esperantaj organizoj, ni pli ol iam opinias necese insisti pri la agitvorto lab.-esperantista : « *For la Neŭtralismon* », samtempe kiel pri la karaktero de *kultura, kleriga* organizo, kiu distingas SAT k kiu malebligas al ĝi partopreni en politikecaj polemikoj, en partieca agitado k en submetiĝo al tiu aŭ alia dumtempa ŝanĝiĝema taktiko.

Ni esperas, ke nia gvidlaboro estas bone komprenata k sekve aprobata de la SAT-anaro.

[1] Fakte en tio SAT ne havas materialan profiton, ĉar F.L.E. pagas ĝuste laŭ la memkostoprezo de la liveraĵo.

XVI-a KONGRESO DE S.A.T.

en MANĈESTRO (Britio)

2-7. aŭgusto 1936.

Adreso de la OKK, 16, Lily Street, Manchester 8 (Britio).

7-a Komuniko.

Kongresejo. — La Kongresejo, « The Co-op Hall », (la koopera halo), Downing Street, *Ardwick*, estas facile atingebla per tramo el ĉiuj kvar stacidomoj. De Exchange (Eksĉejnĝ) k London Road trafu tramon numeritan 19, 31, 32, 33, 34, 36, aŭ 37 ĝis *Ardwick Green* (Ardŭik Grin), kie ĝi haltas ĉe la Halo (kosto 1 penco). De Victoria k Central unue trafu tramon numeritan 11, 12, 13, 15, aŭ 38 ĝis Market Street (1 penco) k poste alian, kiel de London Road

(1 penco). Laŭeble ni renkontos ĉiujn alvenintojn ĉe la stacidomoj, k ni esperas havi je nia dispono du-tri aŭtomobilojn, kiuj utilos por porti la K-dojn al la Halo. Biciklantoj k aŭto-veturantoj, kiuj veturas el la sudo, povas atingi la lokon sen trairi la urbmezon ; ili serĉu *Ardwick Green*, granda placo kiu entenas parkon, k tiam trovos la Kongresejon ĉe ĝia okcidenta fino.

Akceptejo. — La Akceptejo malfermiĝos sabaton la 1-an de aŭgusto, je la 8-a matene, k fermiĝos je la 23-a horo. Dum dimanĉo ĝi estos malferma de la 8-a matene ĝis la 22-a h. K-doj, kiuj alvenas ekster tiuj horoj, aŭ antaŭ la 1-a de aŭgusto, sin anoncu ĉe la SAT-Klubo, 58, Stocks Street (enirejo malantaŭe), Cheetham, *Manchester* 8, kie lacaj vojaĝintoj trovos ripozon — k iom da amuzo. Por atingi la grupejon, oni veturu per tramo el la urbo numerita 11, 12, 13, 14, 15, aŭ 38 ĝis Cheetham Town Hall (kosto : 1 penco) ; tiam transiru la vojon k laŭiru Knowsley Street, turnante vin dekstren ĉe mallarĝa strateto tuj post pli granda strato, Stocks Street. La Klubo troviĝas ĉe la dekstro, kelkajn paŝojn laŭ la strateto.

Poŝtoficejo. — K-doj povos aĉeti poŝtmarkojn k enpoŝtigi sian korespondaĵon en la Kongres-Halo mem. Ĉiuj leteroj k poŝtkartoj estos stampitaj de la poŝto per speciala kliŝo, kun teksto rilata la Kongreson. Ankaŭ ni vendos la kongresajn leterfoliojn, bildokartojn ktp, k provizos tablojn por la skribado.

Fakkunsido. — Interesitoj bonvolu noti, ke okazos fak-kunsido de tipografistoj. Da frakciaj kunvenoj estas anoncitaj ĝis nun du — la socialista k la sennaciista.

OKK.

4-a Listo de aliĝintoj.

54. K-do S. Stojanac, Mitrovica, Jugoslavio ; 55. J. Rival, St.-Etienne, Francio, 56. T. Aldworth, Bedwas, Britio, 57. F. ten Hagen, Amsterdam, 58. K-dino J. Weerman, Amsterdam, 59. K-do A. Cléty, Dunkerque, Francio, 60. X, Svedio, 61. K-do A. Lamb, Birmingham, Anglio, 62. v. d. Starre, Ymuiden, Nederl., 63. SAT-Amika Rondo, Buenos Aires, Argentinio, 64. K-do J. Baxter, Liverpool, Anglio, 65. K-dino L. Peel, Liverpool, 66. K-do G. Roberts, Bedwas, Britio, 67. J. Evans, Trethomas, Britio, 68. K. Jensen, Viby, Danio, 69. J. Wyllie, Johnstone, Skotl., 70. K-dino N. Wyllie, Johnstone, 71. K-do B. McGrath, Manchester, 72. K-dino H. Dillon, Manchester, 73. K-do B. Shimberg, Manchester, 74. Kdino C. de Gier, Hago, 75. K-do v. d. Berg, Amsterdam.

de ni tujan likvidon de nia ŝuldo ; per tio la estraro de SEU esperis atingi ankaŭ la likvidon de SAT mem...

Se SAT ankoraŭ vivas malgraŭ la hontindaj manovroj[1] faritaj de SEU-IPE por detrui ĝin, tion ĝi dankas ne nur al mi, sed ankaŭ al aliaj K-doj, k ni protestas ĉe la aŭdo, ke nia Asocio ne estas libera decidi pri sia orientiĝo, ke ĝi estas sub la influo de la Nederlanda LEA. Certe ni ĉiam tre amike rilatis kun la gvidantoj de la poresperanta asocio en la nederlandlingva teritorio, sed neniam, neniel ili provis influi ekster la statuta vojo sur la gvidadon de SAT.

Tion diri ni opiniis necesa, ĉar rabintoj aŭ rab-aprobintoj ne hontas oblikve kalumnii la rabitojn. Feliĉe malmultaj estas tiaj senskrupululoj...

L. Banmer,
Prezidanto de la PK de SAT.

MONO KIEL PRIVATPOSEDAĴO

Kiam la jugoslava parlamento pritraktis la leĝon por malpliigo de la ŝuldoj, iuj popolreprezentantoj pledis por malforta inflacio. Kiel reago, la direktoro de la eksportbanko Markoviĉ skribis en la registara organo : « Se la inflacio, kiun deziras kelkaj parlamentanoj, efektiviĝas, tiam ekestos ankoraŭ pli granda ĥaoso, ol ekzistas jam nun en la kapoj de la popolreprezentantoj. » Al tio la koncernaj reprezentantoj respondis en la fakorgano *Brivedni* :

« S-ro Markoviĉ, oni devas vidi la ekonomiajn rilatojn kiel ili estas k ne kiel vi faras tra la prismo de la posedantoj de luksaj veturiloj. Monon oni ne rigardu kiel privatan posedaĵon. Mono ne kreiĝis kiel persona avaraĵo, kiun oni povas forfermi. .Ni postulas leĝon, kiu garantias regulan seninterrompan cirkuladon de la mono k severe punas ĉian sabotadon. Mono estas la plej grava trafikilo de ĉiu socio. Ĝi peras ĉiujn rilatojn inter homoj, ebligas ĉian labordividon k per tio formas la bazon de ĉiu kulturo, kiu ja nur povas floradi dank' al la labordivido.»

Fiziokrato.



La Komerclaborista Esperanto-Grupo de Bilbao (Hispanio) okaze de l-Maja Manifestacio ĉi-jara

Al insulto de rabinto respondas la rabito...

Nia unuecemo jam plurfoje montriĝis per faktoj k ne nur per vortoj. Tiel por ne ĝeni la rekuniĝon de ĉiuj senescepte laboresperantistoj ni prisilentas, de pli ol unu jaro, la rabon, kiun SEU-IPE faris al SAT en 1931. Ni parolas pri la preskaŭ 100.000 fr. fr., kiujn ŝuldis k ankoraŭ ŝuldas al ni SEU, k kiu metis nian Asocion ĉe la rando de bankroto.

Sed ni bedaŭre konstatas, ke por kelkiuj la unuecemo estas nur surlipa, ne enkora. Ekzemple M. Malfère, ĉe la lasta Kongreso de la francia sekcio de IPE (Orléans, aprilon 1936) ne hontis diri jenon :

« *La gvidantoj de SAT agas sub la financa influo de la Nederlanda LEA, el kie fontas la plej granda parto el la SAT-monrimedoj. Se oni konsideras la fakton ke SAT ŝuldas egan sumon al sia Prezidanto...* »

Jes, fakte SAT ŝuldas al mi relative grandan sumon, — cetere ne nur al mi ŝuldas nia Asocio, sed ankaŭ al pluraj K-doj, kiuj pruntedonis por savi SAT de bankroto, sekve de la farita rabo. Ni ne povas forgesi krome :

1) ke la presejo Neudrag en Leipzig, kredite produktis niajn organojn dum pluraj monatoj, tial ke ĝi sciis, ke en Moskvo kuŝis granda kapitalo je nia kredito ;

2) ke tiu presejo subite minacis nin per tribunalo, se ni ne tuj pagos. Tion ĝi faris pro la nekontestebla intrigo de la estraro de SEU, kiu intence, laŭplane prokrastis k prokrastadis la transpagon al nia tiama Administracio en Leipzig, ĝis kiam fine ili povis preteksti dekreton de la soveta registaro pri la eksporto de mono. Tiun dekreton ili lerte eluzis por atingi ke Neudrag (cetere kompartieca presejo) postulu

Rezolucioj pri Unueco

Ni ricevis jenajn tekstojn :

Deklaro pri rilato de pollanda SES al internaciaj labor. organizoj esp-istaj.

I. Unua Tutlanda Konferenco de SES, konsiderante ke la esenco de lab. esperantismo estas internaciskala agado por celoj de laborista klasbatalo : 1. opinias, ke morala devo de ĉiu SES-ano estas aparteni al unu el internaciaj lab. organizoj esp-istaj k aboni ties organon ; 2. deklaras sin preta kunlabori kun ĉiu intern. lab. org. esp-ista.

II. Konstatante : 1. ke en batalo kontraŭ atakanta faŝismo la laboristaro devas unuigi siajn fortojn sur komuna bazo klasbatala ; 2. ke plej granda parto de proleta esp-istaro

[1] Kiu volas pli kompletan informaron pri tiu afero, havigu al si « Historio pri la Skismo » (SAT-eldono). Prezo : 2.— ffr. afr.

aspiras unuecon por efektivigo de komunaj taskoj de lab. esperantismo —
la konferenco alvokas ĉiujn internaciajn lab. organizojn esp-istajn (SAT, IPE, ISE) al kunagado sur komuna platformo klasbatala, preparonta organizan unuecon per praktika unuigo de fortoj en agado por komunaj celoj de klaskonscia laboristaro.

III. La konferenco komisias la estraron de SES transsendi ĉi tiun deklaron k alvokon al int. lab. org. esp. k al landaj lab. org. esp-istaj.

.·.

La ĵus okazinta 2-a kongreso de Prolet-Esperantista Unio de Iber-Amerikaj Landoj (P.U.I.L.), decidis sendi komunikon al la 4 lab. asocioj de tutmondo, t.e. SAT, IPE, ILES k ISE pri unanima kongresa decido inviti al menciitaj organizoj fari Aliancon Prolet-Esperantistan Tutmondan por kunigi la fortojn dispecigitajn de nuno rilate al nia komuna afero, ĉu per refandiĝo, ĉu per kuniĝo. La Kongreso opiniis ankaŭ, ke ju pli prokrastiĝos la reunuigo de Prolet-esperantistaro, nacie k tutmonde, des pli malgajnos la tuta lab. esp. movado. Ja la afero urĝegas k ĉiuj respondecaj K-doj devus zorge okupiĝi pri la baldaŭa, sed serioza k lojala solvo.

Samtempe la Kongreso de PUIL decidis ankaŭ malfermi kampanjon, kiu ne povos ĉesi ĝis la plena aŭ almenaŭ parta atingo en niaj celoj. Ankaŭ PUIL apudiĝos kun tiuj, kiuj samdirekton laboros kiel ni. Ni estas senkondiĉe je la dispono de ĉiuj, kiuj sentas la saman bezonon k samfoje ili estas pretaj je ĉia ofero, ĉu principa, ĉu materiala por nia ĉiesa afero. Nur ni devas distingiĝi de burĝa (neŭtrala) movado. For neŭtralismon ĉe niaj rondoj ! La kongreso de PUIL esperas senpacience rezoluciojn similajn al la nia por ke fine iru man-mane ĉiuj prolet-esperantistoj en unu sola tutmonda organizo. Dank' al tio ankaŭ ĉie la enlandaj prolet-asocioj de esp-o proksimiĝos unuj al la aliaj k kune ili laboros pli efike. Nia denuna vekkrio ĉie k ĉiam estu jena : ununura proleta Asocio de Esp-o en tutmondo, k unuopa enlanda organizo de ĉiuj lab. esp-istoj, ĉie. Tiu vojo estas la sole irebla k irinda, ĉar ĝi estas la plej efika por ĉiuj tendencoj. Ĉu ekzistas alia rimedo pli fruktodona ol tiu ? Almenaŭ ni ne konas alian. Ĉu, se ni adas dise kiel nun, profitas el nia disigo aliu ol burĝaro ? Niaj penoj k oferemo nun restas senefikaj, tamen se ni kunirus, ili estus pli palpeblaj.

Lasta diro : ni serĉu kio nin povas alproksimigi k ni forpelu, kio nin dividas. Antaŭen, Gek-doj, k ne forgesu la ekzemplon, kiun donas al ni la neŭtrala UEA, nacie k tutmonde, kies organiza formo estas kredeble la plej taŭga en laborista Esperantio, ankaŭ !

.·.

Al tiuj rezolucioj la P.-K. de SAT faras simple jenan rimarkigon : SAT estis fondita en la jaro 1921 sur principoj akcepteblaj k akceptitaj de K-doj el ĉiuj tendencoj de la lab. movado, eĉ senrezerve k aktive de la K-doj, kiuj gvidas la poste kreitajn samcelajn organizojn. SAT restis fidela al la samaj principoj de larĝa toleremo ankaŭ post 15 jaroj de seninterrompa aktiveco sur la lab.-esperantista kampo. Ni forte rediras fojon plian, ke larĝe malfermita estas la pordo de nia domo al ĉiuj, al kia ajn tendenco ili apartenas, k ke ĉies aparta partieco estas respektata en SAT per la allaso de Frakcioj, kiuj plenutile funkcius, se en ili agadus la K-doj, kiuj nuntempe penadas disigite.

La lastan frazon de l'PUIL-deklaro refutas la historiaj faktoj : Ce kiam UEA forlasis sian sennaciecan strukturon (kun individua membriĝo) k fariĝis centro de kunigitaj naciaj asocioj, ĝi komencis malprosperi k profunde malsani. Kaj ĝis nun ankoraŭ neniu kuracilo resanigis ĝin...

Por kio estas bona la milito ?

Jen estas demando, al kiu la teritori-rabistoj neniam kutimas respondi sincere.

Pro Etiopio ankoraŭ daŭras la diskuto de l'armiloj k diplomataj memorandoj. La itala registaro havas tiun fiersenton, ke ĝi jam per la kutima ilaro enkondukis la civilizon en Etiopio. La angloj opinias, ke al tiu civiliza laborado ankaŭ ili havos ion por aldiri. La itala k etiopa soldato, kiu en diversaj bataloj portas sian haŭton al la foiro, opinias, ke por li estas tute egale, en la nomo de kia ajn ideo aŭ civilizo li devas morti sur la batalkampo.

Sed tiu moviĝema, sanga k danĝera teatraĵo estas nur sursceneja. Malantaŭ la kulisoj estas tute alio. En la pasintaj tagoj oni raportis el Nov-Jorko, ke iu usona bankiero fondis novan akci-societon por ekspluati la naturajn trezorojn de Etiopio, per kvindekjara koncesio. Tiu kompanio uzos anglan kapitalon por elfosi oron k platenon.

La rajtojn de la kompanio la etiopia imperiestro certigis, k estas evidente ke ankaŭ la itala registaro donis sian konsenton. Por la akcisocieto estas tute egale, kiu flago flirtos sur la ekspluatota teritorio. Nur tio estas grava, ke la laborforto estu malkara k la laborinspektoro severa. Se ĉi tiuj kondiĉoj ekzistas k la perantoj ricevas rekompencon por sia penado, tiam estos nenia manko k en la civilizitan Etiopion penetros la ĉefa karakterizo de l'civilizo : la akcisocieta formo kun la plej esenca enhavo : la dividendo en kies intereso suferas la tuta laboranta klaso de la mondo.

Kompilis NO-RA.

NACIISTA VANDALISMO

Sur la territorio de la « Libera urbo Dancig » troviĝas proksime de la urbo Zoppot bela valo, en kiu sur ornamoplaco oni starigis grandan ŝtonon kun nigra, polurita tabulo k sekvanta surskribo : Esperanto-Grund. Jubilea Kverko, plantita de la partoprenantoj de la Universala Kongreso de Esperanto en Danzig k Zoppot por la memoro de la 40-jara ekzisto de la internacia lingvo Esperanto. 31. julio 1927.

La nomata kverko staris en la centro de la placo, bela kreskanta arbo ĉirkaŭita de forta ferbarilo. Malgraŭ tio la arbo kreskis plue. Sed nun, antaŭ kelkaj semajnoj, la bela kverko estas forsegita dense super la tero. La arbon k feran barilon oni ĵetis en la proksiman marĉeton. La tabulon sur la ŝtono oni kovris per cement-mortero. Kaj oni surskribis : « Deutsche reden deutsch » (Germanoj parolas germane). Tio estas la kulturo de l'faŝistoj.

Tra la Esperanta Gazetaro

Nerekomendinda provizoraĵo.

En « Franca Esperantisto » (majo) la prezidanto de l'Lingva Komitato, s-ro Roledelil *(Rollet de l'Isle)*, opinias, ke baldaŭ la ĝisnuna metodo de esperantigo de propraj nomoj (t.e. ĉu plena esperantigo ĉe konataj nomoj, ĉu fonetika transskribado el la nacia ortografio esperanten) ne plu taŭgos, pro la pli rapida disvastiĝo de l'fakoj radiodissendo k turismo. Ni opinias, male, ke pli k pli oni devas trudi la plenan esp-an fonetikon al la propraj nomoj, forpelante la nacilingvajn signojn, fremdajn al la esp-a alfabeto, en la regnon de l'Absurdo.

Sed la prezidanto de l' L.-K. proponas (dikti li ja ne rajtas !), *eĉ por la esp-igitaj nomoj* (krom tiuj de nenaciaj lokoj : kontinentoj, oceanoj) *la metodon uzatan por la aliaj,* t.e. skribadon *laŭ la originala formo* per la esp-a alfabeto *(kun literoj q, w, x, y)* ! Kaj prononci oni rajtu — se oni ne konas la nacian prononcadon — laŭ la *esperanta* silabumado ! Rezulte, nefrancoj elparolu la okcidentfrancan mar-urbon : *bor-de-a-u-ks* anstataŭ *Bordo, to-ur-co-ing,* anstataŭ *Turkueng*; neangloj nomu la faman pentriston *ga-ins-bo-ro-ug* anstataŭ *Gensberi.* Pro tia kripligo de l'parollingvo okazos sendube, ke ĉe kongreso, en paroladoj, neniu anglo rekonos sian famulon, neniu franco sialandajn urbojn, dum skribe (ĉe fonetika transskribo) la rekonado estas tute facila, ĉar en dubaj kazoj oni parenteze povas aldoni la nacian ortografion : *Volter (Voltaire),* ktp.

Ni ne akceptu la provizoraĵon, sed alcelu la definitivan paŝon : *laŭeble kompleta esperantigo de ĉiuj propraj nomoj* !

...kaj oficialigendaĵo !

En « Lingvo Internacia » (Ateno), jan.-majo, *Aris* plendas pri la « tedege longa k torente malfavora argumentado » uzata en esp. gazetoj kontraŭ la oficialigo de l'sufikso *-end,* kiun la praktiko delonge agnoskis ! « Ĉu vi pensis », li demandas la konservativulojn, « kiom kostas ĉiu vorto telegrafe por malproksimaj landoj ? Kial do anstataŭ « end » en lakona lingvo kiel esp-o, uzi perifrazojn, elspezante monon, paperon, inkon k tempon nur ĉar s-ro A aŭ Z, pro simpla gusto, pro persona opinio k precipe pro « idofobio », ne konsentas por la oficialigo de « end », kiu uzita grandskale, uzata k sen ia dubo uzota ĉar uzenda, vole nevole k malgraŭ ĉiaj argumentoj apartenas jam por ĉiam kiel unu el la plej ŝatataj sufiksoj al la tuta ortodoksa esp-ista mondo... »

Ne blufu en viaj informoj !

En « Portugala Esperantisto » (n-o 4) ni legas, ke en Hindio pli ol 30 mil personoj jam lernis esp-on, ke ekzistas tie pli ol 100 societoj k aperas 5 gazetoj esp-istaj. Ni ne scias, kie la redakcio ĉerpis tiun statistikon, sed forte pridubas ĝian veron, eĉ se temas pri brita k nederlanda Hindio kune !

Por bone koni la problemojn de SAT, legu atente k plurfoje jenajn verketojn de K-do E. Lanti:

For la Neŭtralismon ! Prezo: 1.80 fr. fr.

La Laborista Esperantismo 2.40 fr. fr.

(20 %-a rabato por SAT-anoj)

SAT, 67, avenue Gambetta, Paris 20

En nia Movado

(Kroniko)

Britio. La Londona Taksiista Grupo nun ŝanĝis sian renkontejon al « The Little Inn », 269 Gray's Inn Rd., London W. C. 2. Ni tre ŝatus ricevi leterojn aŭ PK, por impresi k interesi la personaron de l'nova renkontejo. (E.G.W.)

Ĉeĥoslovakio. Kiel ni jam mallonge anoncis en la lasta n-o, devis okazi la 21.-22. junio Laborista Virin-k Infantago en *Grünwald (ap. Gablonz)*, kiun la tieaj lab. esp-istoj profitis por propaganda ekspozicio. La samloka esp-a sekcio de l'Kant- k Gimnastik-asocio alvokas la nordboheman lab. esperantistaron por partopreno al la *Distrikta Esp. Renkontiĝo ĉe Wittighaus, Isermontaro*, la 26-an de julio (alveno je la 11-a h. matene). La kunveno estu la komenco, revekiĝo de l'iama forta movado en la regiono. Limrenkontiĝoj kun la germ. K-doj, kiel en pli fruaj jaroj, nun ne plu eblas, malgraŭ nur kelkmetra distanco de l'landlimo, ĉar la « kulturportantoj » en la Tria regno ne ŝatas la esp-istojn. Dum teatra vespero de l'kantistoj k sportuloj partoprenis la esp. sekcio per sukcesa propaganda teatraĵo, simboliganta la unuiĝon de l'tutmonda laboristaro per esp-o. Ni propagandis ankaŭ inter la naturamikoj k instigis ilin fondi sekcion. (*L.E.G., Gablonz*).

Nederlando. — *Roterdamo.* Antaŭ 5 jaroj en R. ekzistis nur centra esp. sekcio en la kadro de LEA. La 18.6.31, kelkaj kuraĝuloj proponis fondi en la *okcidenta* urboparto grupon. Dek du K-doj unuafoje kunvenis en la nova konversaciejo. La unuaj paŝoj estis malfacilaj, sed nun la unua etapo estas atingita : la Tria R-a sekcio memoras la 18-an de junio sian *kvinjaran ekzistadon*. La membronombro en junio 1935 jam fariĝis tiel granda, ke necesis fondi du novajn sekciojn, ankaŭ en la okcidenta parto. Tiam la sekcioj 3-a nombris 68, la 11-a 48 k la 12-a 50 anojn. La nuna stato estas : 3-a sekcio : 98,-11-a sekcio ; 63,-12-a sekcio 68 anoj. Krom tio dum la kvinjaro 80 membroj pro transloĝiĝoj ktp. transiris al alikvartala grupo. El tiuj membroj fondiĝis la Roterdama gevira kantĥoro « Matenruĝo » (60 anoj), kiu ofte plensukcese prezentis sin publike. Ankaŭ estis fondata teatra grupo, kiu prezentis i.a. esp. teatraĵojn (tradukitajn aŭ kompilitajn de la membroj). Daŭrigaj kursoj por jam-aliĝintoj al la Federacio. Infankursoj : lastvintre 4 kun sume 63 infanoj. La 1-an de junio 1934 ni instalis nian « Propran Domon ». Aperis monata sekcigazeto : « Nia Idealo » (preskaŭ ĉiam senpage donita al la membroj). Laŭ mi la fondintoj povas esti kontentaj pri la ĝisnuna rezulto, tamen ili ne ĉesigas la prilaboron de l'okc. urbparto, helpate de multaj Gek-doj. Ĉi-monate ni memorfestas la 5-j. ekzistadon : per festvespero, eldono de speciala klubgazeto, ekspozicio el en-k eksterlanda materialo, daŭranta de 13.-28. junio. La gazetaro promesis raporti (kun foto) pri ĝi. (*W. Borsje*, 18164).

Norvegio. — En *Oslo* la lab. esp. movado vigliĝis lastatempe. Speciale pro la intereso de l'sport-junularo, kiu nun atentas pri la signifo de esp-o en internaciaj rilatoj. Fondiĝis inter ili kantĥoro, kiu fervore propagandas esp-on k faras esp. provlecionojn en rondoj de l'lab. gejunularo k precipe dum la lasta tempo en politikaj distrikt-kunvenoj. Multaj el tiuj kunvenoj sendis rezoluciojn al la kleriga ministerio por atentigi pri esp-o k atingi devigan instruon ĝian en la popollernejoj. La prezid. de « La Kanto » estis alvokita de l'lernejestraro por fari priesp. paroladon en rondo de distriktreprezentantoj por la Oslo-aj popollernejoj. *Decidiĝis okazigi gepatrajn kunvenojn ĉe la div. popollernejoj por pli detale diskuti la aferon kune kun la instruistaro.* Pri certaj rezultoj estas tro frue paroli, sed kiam komencas labori la junularo, ĉiam progresas la afero. — 17 908.

Polio. La Unua Tutlanda Konferenco de S.E.S. okazis al 19-an de aprilo en Varsovio k akceptis krom deklaro pri unueco, kiun ni publikigas aparte, plurajn decidojn rilate organizadon en Polio, rilatojn kun neŭtrala movado, kunlaboro kun neesp. frat-organizoj, propagandon ĉe laboristaro, kurs-organizo, korespondado, gazeto, ktp. La konferenco pruvis, ke la movado, malgraŭ konstantaj persekutoj k administra subpremo, enradikiĝis jam en multaj lab. medioj, k — kvankam malrapide — kreskas daŭre. (W. Lekowski).

Svedio. En oktobro lastjara *Huskvarna Esperantoklubo k Jönköpings Esperantoförening* kune decidis dungi por kursoj eksterlandan instruiston, K-don Herbert Levi el Germanio. Post grandega propagando k multe da laboro ni fine sukcesis funkciigi ne malpli ol 7 kursojn kun sume 145 p. Post la fino de l'kursoj, kies rezulto superis niajn plej optimistajn anticipojn, ni nun decidis daŭrigi la laboron inkluzive de internacia tendaro ĉi-somere. Al tiu tendaro, proksime de Huskvarna, dum 20-27a de junio 1936, ni kore invitas ĉiujn esperantistojn svedajn k eksterlandajn, kiuj volas pasigi sian libertempon ĉe la belega « Vätter »-bordo. Adr. : *A. B. Sandberg, Smâlandsgatan* 33, *Jönköping* (SAT-Peranto).

Usono. — En *Nov-Jorko* stariĝis komence de la vintra sezono 1935-36 nova laborista esp. organizo, kiu alprenis la nomon de l'estinta I.P.E.-sekcio « Laborista Esperanto-Asocio de Norda Ameriko », mallonge « LEANA ». La IPE-anoj tiam decidis oficiale disiĝi k kune kun esp-istoj formi asocion kun nova statuto, kiu permesas la aliĝon de ĉiutendencaj klasbatalaj laboristoj k individuan aliĝon ĉu al SAT, ĉu al IPE, aŭ alia lab. esp. mondorganizo. Diference al aliaj organizoj tiaspecaj, LEANA akcentas sian politikan karakteron, t.e. ĝi proklamas sian klaskarakteron laboristan k stimulas siajn anojn eldebati inter si la diferencojn en opinioj k partopreni en la ekonomiaj k politikaj movadoj de l'proletaro. Ĝi ankaŭ celas disponigi al siaj anoj ĉiutendencan lab. literaturon k instigi al ĝia legado. LEANA celas esti organizo varba k utiliga. Dum vintro malfermiĝis kurso, en kiu la anoj povis instruiĝi pri historiaj okazaĵoj en la esp. movado k pri la klaskaraktero de l'laborista k « neŭtrala » movadoj. Elementa kurso daŭris ĝis nun kun konstante kreskanta gelernantaro. El ili LEANA esperas havigi al si novajn anojn. Nombro da malnovaj esp-istoj skeptike ne aliĝis, preferante trovi mankojn anstataŭ helpi por forigi ilin. La iniciatintoj, sufiĉe sobraj pri la « dornoj sur la vojo », esperas sukcesi ankaŭ en Usono hejmigi Lab. Esp-Asocion akorde kun usonaj kondiĉoj. — *T. Veder.*

Esperanto-Praktiko

Dum la SAT-kongreso, en la jaro 1931, mi konatiĝis kun aŭstria K-do, kiu tiutempe kelkajn tagojn estis mia gasto. Ofte li invitis min viziti lian belan landon, k pasintan monaton mi fine povis plenumi lian deziron. Ses tagojn mi restis en Linco (Linz) k saman nombron da tagoj en Vieno. La K-doj en tiuj urboj faris ĉion por a grabligimian restadon. Ili estis senlacaj, por gvidi min tra la urbo al la plej vidindaj lokoj. Ĉiam mi memoros pri tiuj belegaj tagoj. Ekzistas nun en Aŭstrio nur neŭtralaj organizoj. La estraro devas esti ano de la patrolanda organizo. Sed kelkaj el la anoj plene malkaŝas siajn plej sekretajn pensojn, k tiuj pensoj estas por ni bonvenaj.

J.C. Kries (18151)

Diskutejo

Homamo.

Traleginte la artikoleton de K-do 1004, mi tuj konstatis, ke li malsamopinias kun mi. Mi tre bone povas kompreni tion. Mi do ne bezonas kompletigi mian opinion, nek deziras diskuti kun la K-do. Nur mi dezirus pli da lumo pri la lasta parto de lia skribaĵo. Mi, laŭ li, ne lasis min regi nur de la cerbo, nek de la koro, nek de la stomako... eble de la *hepato* ? Stranga esprimo ! Eble naciismo ? Sed, trankviliĝu, K-do, mi estas tute sana, feliĉe. Ankaŭ *mi* havas bonan konsilon al *vi*. Bonvolu bone pristudi la Jarlibron k precipe la celon de SAT. Ĉar kvankam jam malnova membro, vi ŝajne ankoraŭ ne komprenas la celon. De kiam SAT-anoj edukas unu la alian per kaŝitaj ofendoj ?

K-dino 15.408.

Frakcia Vivo

Komuniko de Bolenfrasat

(Bolŝevist-leninista frakcio de SAT. Adreso : *Sv. Johannsen, Kopenhago*, Australiensvej 24.)

La Permanente Revolucio. — Enhavo de la kvina kajero : *La staĥanovmovado en Sovetio* (ĝia reala signifo k ĝia burokrata degenero, kaŭzoj k sekvoj, kreskanta diferenciĝo en la lab. klaso, nia sinteno ktp.), *La kvara intern. k la milito* (dua parto : la nacia defendo, la defendo de l'demokratio, Sovetio k la milito, la 2-a k 3-a intern. k la milito, centrismo k la milito), *Esenco k signifo de la sennaciismo, Leninismo kontraŭ stalinismo* ktp.

Enhavo de la sesa kajero : la fino de *La kvara intern. k la milito*, plue la artikoloj : *Ĉu ruĝa faŝismo en Sovetio ? La programo de l'Svedia social. partio. La stalinista perfido pruvita nur per legado de « L'Humanité »*, k artikolo de L. Trocki *pri la 7-a mondkongreso de Kominterno*. Prezo por unu kajero 1 int. resp. kupono aŭ 0,20 dan. kr., 0,15 gmk., 0,10 ned. fl., 0,15 sv. fr., 0,70 fr. fr., 0,05 uson. d., 1 Ĉeĥa. kr.. Jarabono estas prezo por 12 kajeroj. Aperas monate.

La Kvara Internacio k la milito aperis en la kajeroj 4, 5 k 6 de la « permanenta », sed aperos pro la granda intereso ankoraŭfoje kiel speciala broŝuro (sepa kajero de la PERM. REVOLUCIO) La prezon vidu supre. Ĉ. 20 paĝoj.

El la enhavo : la preparo de l'nova milito, Sovetio k la imper. milito, nacia defendo, defendo de demokrateco, nacia problemo k imperiisma milito, dua k tria internacioj k la milito, centrismo k la milito, la sovetia diplomatio k la tutmonda revolucio, Sovetio k la imperiistaj grupiĝoj, pacismo etburĝaro, malvenkismo en la imperiista milito ; milito, faŝismo k la armado de l'proletaro ; revolucia kontraŭmilita politiko, la 4-a internacio k la milito.

Al ĉiuj membroj. — Mi petas la membrojn, kiuj promesis pagi monate kotizon, fari tion pli regule. De div. K-doj mi ankoraŭ ne ricevis la monon por la lastaj monatoj. Mi kompreneble ne povas daŭre liveri la gazeton k alian materialon senkoste al ĉiuj membroj.

Oĉjo.

Komunistema frakcio

Ĉu ĝi ekzistas ? Se jes, ĝi verŝajne dormetas. Tamen urĝe necesas : aŭ denove starigi, aŭ veki k revigligi tian frakcion, ne plu nurpartimembrecan sed laŭprincipan. Iom post iom ja oni konsideras la nunan sennaciismemon kongrua kun la SAT-movado — mem ,opinio, kiu verŝajne domaĝas nian reputacion kiel partineŭtralecan klas-organizon. Multe povus fari honesta k laborema komunistema frakcio jam nur per forpreno de erara impreso, kiun nuntempe nia kara organizo efikis (as) en la monda koncepto.

Simpatiantoj skribu al *Jovado, Hoofdweg 103-II, Amsterdamo-Nederlando*. Tiuj, kiuj deziras personan respondon, enkovertigu respondkuponon, aĉeteblan ĉe ĉiuj poŝtoficejoj.

Komuniko de la Sennaciista Frakcio

Dum la lastaj jaroj ne malofte oni povis legi en kelkaj esp-aj gazetoj, ke la *sennaciismo* estas « kontraŭrevolucia », « porimperiisma » tendenco, kiu sekve ne devas havi lokon en lab. esp.-organizo. Sed lastatempe aŭdiĝis voĉoj, laŭ kiuj nia ismo neniel diferenciĝas de la proleta internaciismo. Ne estas ĉi tie la loko por montri la senbazecon de tiaj asertoj. Ni povas do nur konsili al la Gek-doj, kiuj volas prijuĝi la aferon per sia propra intelekto, ke ili havigu al si la verketon, kies titolo estas :

Manifesto de la Sennaciistoj

Se ili legas ĝin atente k kompreneme, ne povas esti dubo, ke sin trudos jena konkludo : *etimologie k praktike la sennaciismo estas neniel asimilebla al la internaciismo.*

Ni ne pretendas, ke oni senkritike konsentu kun nia tezo, sed estas almenaŭ postuleble, ke sinceraj kritikantoj bone konu kion ili kritikas. Interesatoj bonvolu sendi 3 respondkuponojn k ili ricevos 5 ekz-ojn de la 32-paĝa *Manifesto* (po 1 resp. kupono por nur 1 ekz-o). Estas facile vendi 4 ekz-ojn en grupkunvenoj aŭ alie, tiel ke la mendintoj fakte estos elspezintaj nenion.

El la 3.000-ekz-a eldono restas ankoraŭ proksimume 500 ekz-oj en kiuj estas forigitaj la preseraroj, kiuj igas neklaraj kelkajn frazojn. (Samokaze ni sciigas, ke ekzistas franclingva eldono de nia Manifesto.)

Rilate ĉion, kio koncernas la Sennaciistan Frakcion k ĝian organon HEREZULO, oni bonvolu sin turni al ESPERANTO, P.K. 92, *Nyon* (Svisio).

Recenzejo

DLEA-Kantaro. 48 p. Form. 10 × 12,5 cm. Prezo nemontrita. Eldonis : Dana Laborista Esperanto-Asocio, *Aarhus*.

Tiu ĉi libreto, eldonita de niaj danaj K-doj (sen muziknotoj, en poŝformato), helpos al la uzado de esperanto en lab. rondoj de Danio. Ja nenio varbas pli konvinke, ol la kanto. La batalkantoj estas parte pruntitaj (kun permeso) el la SAT-kantaro; oni trovas krome ankaŭ miksitajn kantojn (pri naturo, amo ktp). La bona elekto plaĉos al la uzontoj. Kelkaj preseraroj ne tro grave pezas. Entute la pres-aranĝo estas bona.

Esp. Ŝlosilo por danlingvanoj. Form. 7,5 × 12. Prezo : 15 oeroj. 32 p. La konata Ĉefeĉŝlosilo, entenanta i.a. reklamon por SAT.

C. C. Cowling : *Pri la iamaj Tasmanianoj*. 12 p. Form. 13,5 × 21,5 cm. Prezo : 9 pencoj (6 pc. ĉe aĉeto de dek aŭ pli da ekz-oj). Ricevebla ĉe la aŭtoro : Christ College, *Hobart*, Tasmanio.

La broŝuro prezentas interesan etnografan studeton. Ni ekscias per ĝi, ekzemple, ke « kvankam la aŭstralianoj evoluis, la tasmanianoj restis ĉiel ŝtonepokanoj. Ili vivis en la insulo ĝis la 19a jarcento, k nur formortis tiam pro fitraktado, kiun ili ricevis de la nove alvenintaj blankuloj... » La libreto estas verkita en bona lingvo.

Granda murafiŝo pri la XVIII-a Kataluna Esp. Kongreso en Manresa (31.5.-2.6.1936). Trikolora. Form. 50 × 68 cm.

Rekomendeblaj verketoj por progresintoj :

LA MORTO DE BLANJO (Tousseul)
48 p. Prezo : 3 fr. fr.

RUĜO KAJ BLANKO (Ivin).
68 p. Prezo : 3 fr. fr.

SAT.

MEMORNOTO

Represis el « S-ulo » : *Nelson Leader*, 7. 2. (Vupertal).

Represis el « S. R. » : *Pan*, B. Aires, 22.4. (konstit. en Anglio), 29. 4. (antisem. judoj) ; *La Voix Libertaire*, Limoges, 23. 5. (kolekt. bakejo).

Priesper. artik. k notojn enhavis : *Signalen*, Stokh., 7., 14., 21., 28. 5. 4. 6. ; *La République Sociale*, Narbonne, 14. 5. ; *Simbolo*, Rosario, marto-apr.

Pri la Kongreso : *The Clarion News*, Manch., majo ; *Nelson Leader*, 14., 21. 2.

Korespondado

(Simpla trilinia anonceto kostas 4.50 fr. fr.)

Hispanio

K-do *Luis Pagés*, Fonda Cerilla, *Palamos* (Gerona), dez. interŝ. PM., k belajn PI, kun Gek-doj el tuta mondo. Certa respondo.

Nederlando

Holandano deziras korespondi kun Gek-doj el ĉl. k samtempe interŝanĝi PM. Resp. garantiata. Sendu let. al K-do *Aart de Vogel*, Kanaal c. 11, *Spaarndam*.

K-do *A. G. Zegers*, Tjalkstr. 9, *Eindhoven*, stacidoma fiakristo, dez. kor. kun Gek-doj el ĉl. Certa resp.

Gek-doj de Esp.-Grupo dez. kor. kun Gek-doj el ĉl pri ĉt. Certe resp. Adreso : K-do *J. P. Bogaard*, Walstr. 14, *Terneuzen*.

Deziras korespondi K-do *P. v. d. Weerd*, fervojkonduktoro, PI, L, kĉl. Certe respondos. Adr. : Korhoenweg 19, *Apeldoorn*.

Du Gek-doj deziras koresp. kun K-doj el ĉiuj landoj pĉt., interŝ. gaz. k PM. Skribu al K-do *B. J. Assink*, K. Oosterschestr. 1, *Almelo*.

Polio

Lab. Esperanta Sekcio ĉe sporta lab. klubo en Janov dez. kor. kĉl. pĉt. Resp. gar. Adr. : *Franco Denkowski*, str. Planty 3, *Janow k. Katowice*.

Portugalio

L.E.S. (*Progresemaj Amikoj*), *Barreiro*, dankas al ĉiuj letersendintoj k pardonpetas, ĉar ili ne povas respondi al ĉiuj, pro tro da korespondaĵo ricevita.

Esperanto Grupo « Fratiga Stelo », Rua Paulo da Gama, 6-1°, *Lisbono*, petas koresp-adon por siaj gelernantoj kĉl. pĉt.

Tre bonvena legaĵo kun aktuala enhavo estas ĵus-aperinta

FRATECO EN LA VIVPRAKTIKO

de *H. Roland-Holst* (Trad. de *Buis*)
28 pĝ. Prezo : 1.50 fr. fr.

SAT. (= resp. kupono)

Baldaŭ liverebla estos
3-a lingve revizita eldono de

LA KOMUNISTA MANIFESTO

de *K. Marks* k *Fr. Engels*

56 paĝoj (anstataŭ 48), formato 12 × 18, kun tre aktuala k interesa antaŭparolo de l'konata ekonomiisto, nia K-do *Lucien Lora*
Kun portreto de K. Marks.

Prezo : 3.— fr. fr. *SAT.*

KATOLIKOJ AŬSKULTU !

Kiam la jubilea kongreso de F.L.E. en Hago traktis la forigon de « S-ulo » kiel organo por ĉiu federaciano, tiam la delegito de l'proponinta sekcio interalie faris la rimarkigon, ke kelkfoje en « S-ulo » aperis artikoloj, kiuj estis ofendaj al... katolikoj. La argumento estas tute senvalora, ĉar : 1°) Se ili estus konsciaj katolikoj, tiam iu ofendo aŭ kontraŭa opinio ne povus ŝanceli ilian koncepton, 2°) ili verŝajne neniam estus aliĝintaj la Federacion. Ni do rajtas konkludi, ke tio estis nur preteksto. Tamen, la *vero* ne povas esti ofenda. Tial mi sendas jenan priskribon, kiu por katolikoj speciale, sed ankaŭ por aliaj havos intereson.

Antaŭ nelonge la gazetaro raportis pri la kondamno de prof. Ude el Aŭstrio, ĉar en publika letero al Musolini li esprimis sian abomenon pri la kruela rabiro en Abisenio. Musolini pro tio postulis de la aŭstra registaro la punon al Ude. La registaro humile obeis. Ude estas 4-obla doktoro. Dum 35 jaroj li estas docento en la Universitato de Graz. En 1911 li fondis la unuan senalkoholan manĝejon en Aŭstrio. Ĉirkaŭ 1924 li batalis kontraŭ la prostituo k knabinkomerco. Li fondis infanvartejojn k div. unuiĝojn. Ĉion tion konsentis la kat. eklezio, kies reprezentanto li estis, ĉar tio ja koincidas kun la ekstera vizaĝo de ĝenerala bonfaremo. Sed, lia amo al vero kondukis lin al ĉiam pli delikataj punktoj, k kiam li en 1926-28 pasis postulis en kunvenoj la forigon de la kapitalisma ekonomio, la forigon de la orgarantio por la aŭstra valuto, ĉar la orgarantio estas nur trompo, per kiu oni ligas la valuton de iu lando al la internacia orspekulacio, — justan monreformon k la eksproprigon de la grundposedantoj, tiam en 1929 la episkopo Pavlikovski el Aŭstrio deklaris pri Ude la parol- k verkmalpermeson. Samtempe li malpermesis al ĉiuj teologoj la viziton de la lekcioj de prof. Ude. En 1934 li estis eksigata el la ofico ĉe la universitato de Graz, kiel unua viktimo de la kondordato inter la Vatikano k Aŭstrio. En la sama jaro la polico konfiskis 2 el liaj broŝuroj :« Liberekonomio, Mono aŭ Oro ? » k « La granda mizero de nia epoko k ĝia venko per liberekonomio ».

Pro la « ofendo » al Musolini li estas kondamnita je 1100 ŝilingoj aŭ 30-taga karcero, por unu el la broŝuroj je 550 ŝil. aŭ 15-taga karcero. Kiam li tuj post la kondamno anoncis sin ĉe la malliberejo, oni forsendis lin. Nun amikoj de li timas, ke oni konfiskos lian pension. Pli klare la kat. eklezio ne povas montri sian kapitalist-amikan vizaĝon.

Fiziokrato.